# FEL

Kara literaturamanto,

Nia oferto ampleksiĝis kun kelkaj pliaj libroj:

### 1. Sonorilo de Islando




Ĝi estas la plej konata verko de la Nobel-premiita islanda aŭtoro Halldór Laxness. La romano rakontas pri malfacila epoko en la historio de Islando, malfrue en la 17-a jarcento kaj komence de la 18-a, kiam Islando estis subpremita de severa regado de la Danoj, de epidemioj, malsato kaj komerca monopolo. Ĝi priskribas la longdaŭran proceson de malriĉa farmisto, Jón Hreggviðsson, kiu estis kondamnita al skurĝado pro ŝtelo de fiŝhoka ŝnuro kaj en la posta jaro al ekzekuto, ĉar onidire li mortigis la reĝan pendumiston. Antaŭ la ekzekuto Jón Hreggviðsson eskapis el la kaptiteco kaj sukcesis fuĝi el la lando. Post aventuroj i. a. en Holando li fine atingis Kopenhagon, kie li daŭrigis sian entute pli ol tridekjaran batalon kontraŭ maljusteco kaj justico…

Jen la ligilo: http://retbutiko.be/eo/ero/sdis

### 2. Esperanto por mi 8




Nova kolekto de 16 portretoj faris de Helga Ploetner, kiujn la pentristino verkis per krajono. La portretojn akompanas po unupaĝa biografieto, verkita de la portretitaj mem, kaj kolora reala foto.
Portretitaj estas jenaj personoj:

Ana ALEBIC-JURETIC, GIM Inhye, JUNUKAUA Mikio, Dimitrinka KATEVA, Sebastian Peter KIRF, Rafael Soares de LIMA, Mallely Martinez MATEOS, MORIŬAKI Jasuma, Pendo Charles NGALLABA, Jorge Rafael NOGUERAS, Heide Martha OTTO, Helga PLÖTNER kaj filino Jana DETLEVSEN, Bardhyl SELIMI, Fritz WOLLENBERG, Lidja ZAMENHOF

Jen la ligilo: http://retbutiko.be/eo/ero/pormi8

### 3. Tri rakontoj/Trois contes (dulingva eldono)




"Tri rakontoj" estas la lasta verko publikigita de Gustave Flaubert.
Ĉiu tri el la rakontoj disvolviĝas en malsimila etosto, en Normandia kamparo de la 19-a jarcento, en mezepoka legendo de sanktulo, en Proksim-Orienta antikveco, tiel ebligante panoramon de la diversaj tonoj traktitaj de Flaubert en sia verkaro.
Tiu nova traduko de la tri rakontoj en dulingva eldono ebligos al la leganto pli homogenan komprenon de la aparteco de la stilo de Flaubert, laŭdata de multaj kiel unu el la plej elstaraj aŭtoroj en la franclingva beletro.

Jen la ligilo: http://retbutiko.be/eo/ero/trrk

**4. Reaperis: Gerda malaperis** Ĉu necesas ankoraŭ prezenti tiun ĉi lingvo-instruan romaneton de Claude Piron? Finfine ĝi estas denove havebla, en nova veŝto! Ideala legaĵo por finintoj de baza kurso.




Jen la ligilo: [http://retbutiko.be/eo/ero/gerdf](http://retbutiko.be/eo/ero/gerdf)